

1922-02-02-sergeant-fousek_1

Mia kara amiko.

Eble vi estos surprizata vidante leteron de ni hodiaŭ. Estas vi kiu ŝuldas unu al mi ĉar mi jam skribis al vi la 13an de Jan.

Sed... mi estas malsana de post 10 tagoj – pluegas. Ĉio estas malgaja, griza, nebrila, & mi enuiĝas. Mi estas malkuraĝema & ne havas la inklinon entrepreni grandajn laborojn, do mi pensis „eble mi babiladus iomete kun mia samkongresano & amiko“.

Mi havas bronkiton. Mi havis febron la 4unuaj tagoj & mi nun estas tiel malforta & tusas multe. Mi legis & skribis iomete & enuiĝis multe. Precipe hodiaŭ kiam la eksteraĵo estas terura, malgaja, malseka & malhela!!!

La pluvego falas kvazaŭ ĉiuj sanktuloj en la ĉielo, koleraj, verŝus, ĉiujn akvojn kiujn ili havas kun grandegaj potoj. Ventego aŭdiĝas en la arboj. La arboj antaŭ nia domo sur la bulvardo estas tre tre altaj & la vento moviĝas la branĉaron preskaŭ rompigante ilin. Ĉio krakas!

Kiam ne estas pluvo samtempe mi aŭskultas volonte la grandajn bruojn en tiuj arboj.

1922-02-02-sergeant-fousek_2

Ili parolas al mi & mia imago vagadas... & vidas tiom da teruraĵoj, precipe sur maro.

Hodiaŭ, mia humoro estas malgaja & mi volas esti sana pli rapide. Mi estis tiel bonsana antaŭ tiu bronkito.

Kiel bedaŭrinde estas ke vi ne povas eniri kelkajn momentojn babiladi kun mi. Vi ekgajigos min. Vi rakontus kiel via Eva fartas, kreskas, ridas, baldaŭ paroletas!!! Vi rakontus kiel estas via nova hejmo, kie estas via kancelario, via manĝĉambro, via kuirejo, via koridoro, k. t. p.?

Vi dirus ĉu estas ĝardeno? Ĉu ĝi estas antaŭ la domo aŭ malantaŭ? Ĉu estas rozoj ruĝaj aŭ blanka jen ĝi? Vi dirus kie vi ludas vian violoncelon? Vi dirus kion vi kantis la lastan dimanĉon, vi eble eĉ kantis. Vi prenis vian ĉapelon por refreŝigi la atmosferon (kiel ventŝirmilo)!!! Vi parolus, vi ridus & poste... tute surprizata ke horoj pasiĝis tre agrable & mi ne plu estus malĝoja & estus preskaŭ kuracita... Ho! imago mia kien ci kondukos min? Ho! revoj miaj, ĉu vi estos

1922-02-02-sergeant-fousek_3

nur ĉiam revoj?...

Kaj la papo mortis! Kaj Shackleton ankaŭ!

Kiaj malĝojaj sciigoj, precipe pri Shackleton. Kia mirinda homo, maristo & esploristo. Ĉu ne estas terure morti ĵus en la komenco de sia granda 5 jara esploro al la suda Poluso?

En la gazetoj, oni rakontas ke li edziĝis en 1904, lasas du filojn & unu filinon de 15 jara. Kaj nia najbarino en la Restoracio Reprezenta Dŭm en Praha? Vi memoras ŝin? Bela brunino kun la **b...?** oficiala delegito? Ŝi diris ke ŝi estis la filino de Shackleton & ŝi estis eble 25 aŭ 30 jara. Eble li faris antaŭan edziĝon. Ŝi estis ĵurnalistino por la „Daily Express“. Ĉu vi memoras kiel S-ro Von Frenckell ĉiam serĉis pri ŝi?

Via edzino sendube multe ploris la papon?

Ĉu vi sciis ke la Konklavo rajtas elekti iun kiu ne estas religiano? Mia edzo demandis al mi: „Aimerais – tu si jé´tais nommé Papé?“

Ĉu vi iras al Prot.diservo ĉiu Dimanĉe? Se jes, ĉu via ribela animo ne trovis tion kion li serĉas?

Mi supozas ke ne. Vi neniam trovos. Antaŭ mi staras belaj floroj de la Sudo

1922-02-02-sergeant-fousek_4

S-ino el Algerio kiu multe amas min bombardas min donacoj. Korbuloj da fruktoj, belegaj fotografiaĵoj de Algerio, k. t. p. Mi ŝatus sendi al vi kelkajn fruktojn sed, veturante, ili difektiĝus.

Ŝi estas tre kontenta - & tre sindonema al mia edzo ĉar li pledis tre lerte & eksedziĝis ŝin (divorcé). Ŝi nur estis edzigitita 3 semajnoj. Ŝi nun reiris en sian landon Bone (Algerie).

Ĉu vi ricevas komunikaĵoj en la gazetoj pri Helsinko? Mi, jes, & tio allogas min. Mia edzo diras al mi ke mi povos iri sola. Mi ne ŝatus multe iri sola kvankam multaj aliaj esp. estos kun mi. Mi forte deziras vidi Stockholmon & mian malnovan amikon. Ho, sendube mi tute ne iros.

Mi ricevis leteron de S-ino Zamenhof kaj lastan foton de la tombo de sia edzo. Ĉirkaŭ ĝi staras S-ino Z. S-ino Ferter – Cerise el Parizo (vi memoras ŝin), s-ro de Belmont & edzino, vi ankaŭ memoras nian poeton.

Li skribis poezion por mi en la balo & li invitis min hejmen, en Varsovio 1923. La filo de Grabowski ankaŭ staras apud s-ino Z. Malfeliĉa Grabowski! Kiel belega poeto! Li estis nia granda amiko.

Mi ĉiam!!!

3.Feb.11h en lito

Mi komencis hieraŭ & ne scias nun tion kion mi volis diri al vi. Mi ĉiam?!!! ... Mi povas fini timo

1922-02-02-sergeant-fousek_5

frazoj multaj maniere. Mi ĉiam!!! Mi kredas ke mi finos ĝin tiele. Mi ĉiam rememoras kun ĝojo, la dolĉajn impresojn en Praha kiuj dank'al mia amika korespondanto estis pli dolĉigitaj.

Ho! Jen mi rememoras kion mi estis ekskribinta hieraŭ vespere: Mi ĉiam ricevas P.K. & leterojn de viaj samlandanoj petante ke mi skribu al ili.

Tio estas pro s-ro Berger kiu enmetis mian nomon en B. E. S. Mi skribis al li antaŭ longaj monatoj, sendante malgrandan sumon & P. M. petante ke li faru ion por trovi pastron Stefano Varszaly apud Eperies kiu iris Amerikon en 1920. Li estis tre bonkora homo & skribis ofte al mi. Mi okupiĝis multe pri lia foriro en la ŝipo & lia lasta letero diris kiel li rekompencus min!!! De tiam! Nenio.

Ĉu li droniĝis? Ĉu li mortis? Mi petis de s-ro Berger ke li bonvolu skribi en la antaŭa urbo de la pastro petante la novan adreson en Ameriko. Li neniam respondis. Ĉu li estis malkontenta pri mi? Tamen B. E. S. signifas „fari servon“ ĉu ne? Ĉu li trovis ke la sumon estis tro malforta? Mi sendis, mi kredas, unu

1922-02-02-sergeant-fousek_6

frankon francan & ½. Kaj mi petis ke li diru al mi ĉu tio sufiĉas. Tamen li ŝajnis tre afabla kun mi en Praha & la edzino ankaŭ.

Jen, mi enuigas vin pri miaj malfeliĉoj & mi ne devas & mi ne volas.

Ho! Kiam la sumo revenos? Kiam alvenos printempo , & la floroj? Ĉio estas monotone griza & nebula.

Nun, kara amiko senkulpigigu min se mia letero ne estas tiel gaja kiel kutime.

Mi esperas ke vi, via edzino & via infanino tute bonsanas.

Ĉu vi revidis viajn kuzojn en Praha?

Ĉu vi memoras tiun postteatra „vespermanĝon“?

Mi vidas ĉion kvazaŭ mi ĉeestus nun. La ŝinkon sur la teleroj, la blankan vinon, la vizaĝon, la vestaĵojn de via kuzino & de la amikoj. Miaj okuloj ri(e)markis ĉiun detalon. Kaj mi nur povis rideti al ili.

Eble mi baldaŭ ricevos leteron vian.

Ho! Mi esperas. Amikan manpremon & tutkorajn salutojn & rememorojn

Alice Sergeant